



Enhavo

- Elstaraj eldonaĵoj de ILEI:
 - Juna amiko – elŝuteblaj afiŝoj
 - Internacia Pedagogia Revuo
- Virinoj subtenataj en Afriko
- Nova Afrika Bulteno

EKO 2019-16 el Budapeŝto la 9an de novembro.

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Juna Amiko – varbiloj je via dispono!

Tiu rimarkinda revuo liveras valoran materialon por lernantoj. Ne sufiĉas bazaj retkursoj, ni devas aktive proponi al tiuj novuloj konvenan legomaterialon en ne tro komplika lingvaĵo. Tio delonge ekzistas; la revuo *Juna Amiko* estis lanĉita de la tiama Hungara Esperanto-Asocio en 1974 sub la redaktado de Geza Kurucz. En sia 42-jara historio, ĝi havis nur kvar redaktorojn. Ja ĝi dekomence havis fortan kaj tre internacian reton de altnivelaj verkantoj. Transprenis la eldonadon nia instruista Ligo, ILEI, en ĉ. 1999.

Sed la revuo bezonas pli da abonantoj, ĉu pere de supera membreco de ILEI (kiu inkluzivas abonadon de *JA*), ĉu per simplaj abonoj. La financa stato de la revuo kaŭzas al ILEI severan financon situacion.

Jen mi sendas al vi kelkajn afiŝojn, kiujn vi povos uzi por la varbado, kunlabore kun la perantoj kaj la sekcioj de ILEI. Ili povos esti dissenditaj al membroj de via grupo aŭ asocio, proponataj al la redakcioj de diversaj revuoj. Ili povas esti facile vidigeblaj en retejoj.

Ni forte antaŭdankas pro ĉiu helpo, kiun vi povas proponi. Bv. nepre elŝuti kaj legi la afiŝojn.



Stefan MacGill, komisiito de ILEI pri varbado por *Juna Amiko*



Pedagogia revuo 100-numera!

Eĉ pli longan historion havas la oficiala organo de ILEI, la *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR). Ĝin ricevas ĉiu membro de la Ligo, ĉu papere, ĉu rete. En la jubilea numero, la redakto Jozefo Nemeth resumas la centnumeran historion de la revuo, Ĝi komencis sian vivon en Germanio, estis siatempe presita en preskaŭ dek landoj, kun signifa nombro da redaktoroj – el tiuj la nuna sendube havas la rekordon; li redaktas ĝin kontinue tra 25 jaroj, ene de kiu la teknologio multe progresis, tiel ke la revuo nun estas inter la plej bonaj de la Esperanta mondo. En tiu kvaronjarcento Jozefo pretigis kvar mil paĝojn kun sume miliono kaj duono da vortoj.

Scio Sen Bariloj okazigis SEminarion por Vlrinoj

Tiu seminario sum la akronimo SEVI okazis ĵus en Kotonuo, Benino, pri kapablo de virinoj en gvidaj roloj, malkovro kaj eklernado de Esperantom legado kaj skribado de la fonua lingvo, ĉefa benina lingvo. Temas pri la tria tia semajno kun homogena grupo el universitatnivelaĵoj junaj virinoj. Venis subteno de privatuloj al SSB. Rezulto estas, ke SSB povis akcepti 20 partoprenantinojn. Biologio, merkato, sociologio, antropologio, geografio, agrikulturo, informatiko, kemio, librotendado, juro, asekuroj, estas iliaj studobjektoj. Ili nun studas aŭ jam finstudis kaj serĉas laborpostenojn.

Lunde matene 28-an de oktobro 2019 okazis la malfermo kun diversaj prelegoj. La prezidanto Privas Tchikpe prezentis la asocion 'Scio Sen Bariloj' kaj ĝiajn agadojn en Benino, Togolando kaj Senegalio; Mireille Grosjean prezentis la tri aksojn de la seminario parolante pri arbo: radikoj (fonua lingvo) trunko (lertigado de virinoj en gvidaj roloj) kaj branĉoj (Esperanto por malfermi sin al la mondo) kaj menciis la Internacian Jaron de indiĝenaj lingvoj en 2019. La ĉefino de la 10-a distrikto de la urbo Kotonuo, Sinjorino Monique Konhonou, vic-urbestrino, partoprenis la malfermon kaj parolis kuraĝige al la partoprenantinoj. Venis du reprezentantoj de la ŝtata oficejo pri instruado en la naciaj lingvoj kaj la du instruistinoj de la fonua lingvo dungitaj de SSB. En la jaro 2020 SSB planas kvar tiajn seminariojn.

La UEA-konto de 'Scio Sen Bariloj' estas assb-k

Privas Tchikpe, prezidanto; Mireille Grosjean, membro

Aperis la 39-a numero de "Esperanto en Afriko"

Tiu numero prezentas la sekvan enhavon:

- p.1 Enkonduko
- p.1 Afrika Kongreso 2019: ĉu la rekorda E-renkontiĝo?
- p.2 Nova Afrika Komisiono kun novaj komisionanoj
- p.2 Agadplano de la nova Afrika Komisiono de UEA
- p.3 AMO-61 en Buĵumburo, Burundo – temaro kaj alvoko
- p.3 Konservu gazetajn artikolojn ĉe archive.org
- p.4 Jérémie Sabiyumva: vi povas subteni la 7-an AKE
- p.5 Biblioteka Apogo de UEA
- p.6 Konversacia rondo en DR Kongo
- p.6 Librosendo al Afriko
- p.6 ILEI gratulas DR Kongon
- p.7 Pretas la voĉlegita oktobra numero de Esperanto
- p.7 Poemo: Al mia patrino de Camara Laye
- p.8 Forpasis Ambross Fraten Polle

Aliru la bultenon ĉe <https://www.esperanto-afriko.org/bultenoj.htm>

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis numero 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaĵoj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.